

Amiko kara mia. ¹

Hieraŭ vespere, mi ricevis vian longan + tre ŝatatan leteron. Mi ne povis trovi momenton al ĝi respondi antaŭe + eĉ nun mi atendas viziton ĉiu momente. Aliaj personoj foriris antaŭ 5 minutoj.

Kion mi devas diri pri via letero? Pripensante al ĝi mi trovas multajn argumentojn, multajn pridiskutojn pri ĝi. Sed sidante + skribante kviete, estas alia afero + ĉio kion mi al vi ŝatus diri forflugis Sed reprenu de la komenco.

Tagmanĝante en la Brasserie Flamande teretaĝe kiel vi faris ... + vidante multajn Esp. ĉie + ne vidante min, ĉu vi ne pensis ke estis granda salonego en kiu ne estus ĉiuj kune kun manĝantaj? Ni estis multegaj - eble 500 - + la honora tablo staris ankaŭ kun ni + oni faris paroladojn!!! Ĉu vi ne povis supreniri? Ho! kiel estis bedaŭrinde!! Mi tiel + tiom serĉis pri vi sur la stratoj + je la tramveturilo! Sed la sorto volis malhelpi min vin adiaŭi!!!

La Ostenda vivo miregis vin pro sia mondaneco! Kaj tio estas ne komparebla al Paris-Plage (tute apude de Boulogne), Deauville, Trouville, Dinard k.t.p. Estas necese ke vi forlasu Pŕelouč de tempo al tempo! Eble vi ne plu serĉus direktilon por via malsana animo.

Vi skribas ke ŝajnas al vi ke en via vivo vi ĉiam malsupreniris.... ĉu kontraŭe, en tiu-ĉi Kongreso vi ne supreniris, ĉu via idealo ne estas pli alta?

Vi diras ke neniam viaj idealoj realiĝis... sed kiam idealoj ~~ne~~ realiĝis ili ne plu estas idealoj ... ili iĝas materialaĵoj. Vi demandas ĉu via viv-vojo iras la bonan direkton kiun vi ĉiam volis sekvi? do, vi havas volon, do, vi scias kien vi volas iri. Kial vi diras ĉiam ke vi ne scias kien vi volas iri? Vi ne scias, vi diras, tiu kiu estas la rekta aŭ la malrekta vojo - vi ne scias kiu estas peko aŭ ne peko. Kio estas peko vi demandas? kie ĝi komencas?

Tiuj estas malfacilaj demandoj. Por kelkaj, io estas peko, por aliaj tio ne estas peko - precipe por religianoj, multe estas peko... sed ili ~~ĝin~~ pekas ... + ĝin konfesas poste. Sed por ni kies religio ordinara ne ekzistas, ĉu nia devo ne estas: ne fari al aliaj tion kion vi ne volus ke ili faru al vi. Estas eble iom egoista teorio, sed ĉu ~~ĝi~~ ĉio ne estas egoisteco sur tiu-ĉi tero?

Vi demandas kio estas amikeco? Al tiu demando estas ankoraŭ pli malfacile respondi. Amikeco inter homoj estas bela sed ĝi tiel ofte difektiĝas pro mono, situacioj, virino. Inter virino + viro ĉu ĝi ekzistas vere? estas ĉiam la allogeco de la seksoj kontraŭaj + eble pro tio ĝi valoras + daŭras pli longe + pli sincere ol inter homoj.

Vi demandas kiu direktas vin, via volo aŭ viaj agoj? Tie mi pensas ke mi povas respondi al vi ke estas la volo de aliaj + tute ne la via + kiam ne estas la volo de aliaj, estas la vivcirkonstancoj + la konscienco kiu scias bone kio estus bona aŭ malbona por via vivo.

Sed estas tre malfacile paroli pri tio. Oni ne scias kian konsolon doni al iu kiu ne bone vidas sian vojon. Sed, en tiu okazo, ĉu imago ne sufiĉas? Kiam la direktilo mankas, eble, imago + idealeco povas anstataŭi ĝin?

Sed, tio estas iom nebula. Pli bone estus aĉeti aŭtomobilon + okupiĝi multege, intense pri ĝi + serĉi la vojon kun ĝi ... ĉiam idealigante.

¹ margene: "Viaj P.Markoj interesigis + ĝojigis - precipe tiuj de 0,30. Ĉu "azurea" ĉiam plaĉas?"

Vi ne parolas pri via kongresa semajno! ĉu ĝi ne plaĉis al vi? ĉu vi estas pli kontenta ol antaŭ via foriro el Pŕelouĉ? aŭ ĉu vi bedaŭras vian vojaĝon?

Ni revenis antaŭ hieraŭ - aŭtomobile - iom lacaj. Nune, mi kolektas miajn rememoraĵojn + rememorojn de la Kongreso + ... komencas idealigi .. intense.

Mi trovis P.K. + leterojn de kongresanoj kun kiuj mi apenaŭ parolis demandante, fotojn de mia en kostumo + petoj por korespondi.

La restado en Waulsort estis ripoza + bela. Oni bezonis tion post la skuoj nervemaj de la Kongreso.

Dankegon por via letero - skribu pri ĉio kio iritas aŭ miras vin. Ĉiam ĉiam mi simpatios + komprenos viajn animstatojn. Ĉu mi povos iomete konsoli la malsanajn statojn mi ne scias, sed mi ŝatus + provus.

Do, al vi mi premas manojn esperante ke vi ne restos monatojn sen skribi.

Ĉiam afekcie + tre amike same

ĉiama Alice